## Raporto pri la jarkunveno de ISAE

La kunveno okazis enkadre de la 69-a Universala Kongreso en Vankuvero, salono *Petit*, ekde la 9-a horo, la 24-an de julio 1984.

Partoprenis pli ol 22 personoj el 7 landoj: 13 el Usono, 2 el Ĉinio, 2 el Japanio kaj po 1 el Bulgario, Hungario, Finnlando, FR-Germanio kaj Kanado.

Sonbenda registraĵo de la tuta kunsido (75 minutoj) estas havebla de Magentofona Servo de UEA.

S-ino *Janet Bixby*, blinda kolegino el Ĉikago, raportis enkonduke, kiel la Esperanto-grupo de Ĉikago ricevis la rajton traduki kaj eldoni la libron *GENERAL, ORGANIC & BIOCHEMISTRY* de *H. Stephen Stoker* kaj *M. R. Slabaugh* de la eldonisto *Scott, Foresman and Company*.

Post tio legis s-ro *James Laux*, ankaŭ el Ĉikago, la artikolon de *Doug Portmann (P.O. Box 124) New Martinsville, W. Va, 26155*, Usono): PROJEKTO *Ĝ.O.B.K.* — TRADUKI KEMIAN LERNOLIBRON EN ESPERANTON.

*R. Eichholz* dankis al la preleginto, ke li liberigis lin el embarasa situacio, ĉar nur du tagojn antaŭ lia ekveturo al UK li ricevis la informon, ke li devus gvidi tiun kunvenon kaj prezenti la raporton de la ĝenerala sekretario de ISAE, kiu ne povos partopreni la kongreson. *Eichholz* tuj petis la sekretarion, ke li sendu tiun raporton tuj al UK, ĉar li certe ne plu ricevos ĝin en *Bailieboro*. Tamen la raporto ne plu alvenis ĝustatempe. Tial *Eichholz* proponis, ke tiu raporto de s-ro *Portmann* servu kiel bazo por diskuto, kaj li esprimis sian ĝojon pri la jam de la ĥemiistoj farita laboro. Li rimarkis, ke li ne trovis ion kritikindan en la aplikitaj labormetodoj kaj en la atingitaj konkludoj. Li opiniis, ke estus utile diskuti pri ĉi tiu raporto.

Oni demandis, kiel oni interŝanĝis kaj kontrolis la tradukojn, ĉu ankaŭ alilingvaj esperantistoj partoprenis la tradukojn kaj kiom da personoj partoprenis la laborojn. Oni demandis, kial «des-» estis preferita anstataŭ la prefikso «mal-» en ĥemiaj terminoj, kaj kial oni decidis ne ŝanĝi leĝe protektitajn nomojn, kaj similajn detalojn.

Post tio *Eichholz* petis starigi demandojn pri la laboro de ISAE, kiujn li magnetofone transdonos al la sekretario. Oni demandis pri ebleco aliĝi al ISAE. S-ro *Thomson*, la landa delegito por Usono, raportis pri siaj spertoj kaj kondiĉoj, sub kiuj li povus daŭrigi sian funkciadon. Li transdonis leteron por *Darbellay* kun kopio al prof. *Stóp-Bowitz*. La kotizo devus ne ŝvebi, sed esti fiksita por minumume 18 monatoj.

Oni anoncis prelegon de prof. *Sherwood* pri la projekto de Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado. Prof. *J. Pool* petis, ke personoj scipovantaj la anglan kaj Esperanton partoprenu eksperimenton per plenigo de demandilo.

Malfru-alveninto denove petis informojn pri la stato de ISAE kaj plendis ke la japana delegito ne funkcias bone. Oni devus simpligi la laboron.

Fine oni transdonis al Eichholz la kompletan malneton de la traduko de la ĥemia lernolibro.

Raportinto kaj gvidinto de la kunveno: *Rüdiger Eichholz*.



# Afekcioj en turismo

*Tyburcjusz Tyblewski* (Pollando)*

## 1. Enkonduko

Mi intencas prezenti turismon kiel fonton de travivaĵoj. Mi kunigos respegulon de la socia realo (ĉefe en Pollando) kun psiĥologia kaj sociologia argumentado.

Laŭ la populariĝinta difino de turismo (*Przecławski 1973*), vojaĝo devas liveri al turist(in)o la travivaĵojn, sekvantajn el vizitado kaj kontaktoj kun elementoj de la vizitata medio (la naturo, la homoj, la kulturo), gvidante al **plezuro**.

Dum al la ekkonaj procesoj en turismo oni dediĉis relativan atenton *(Danecki 1969, Libera 1965, Wojciechowski 1973, Zürn 1976)*, al la rolo de la afekciaj, al travivado — apenaŭ nemultan (i.a. *Tyblewski 1978)*.

Al la studita kaj spertita scio mi intencas aldoni hipotezajn proponojn, kies kritikon de la atentemaj legantoj mi akceptos dankeme.

## 2. Difinoj, klarigoj

| |
|---|
| **Afekcio estas la proceso travivadi kaj respeguladi rilaton de la individuo al la mondo kaj al si mem.** |

Du aplikatajn nociojn — emocion kaj afekcion — oni relative ofte samigas. Estas do necese klarigi, ke fiziologio de la supera nervoaktivado ligas la emoci-erĝan** sferon kun aktivado de subkortikaj centroj, kaj la afekcian sferon — kun funkciado de la kortiko. Tamen la aktivado de subkortikaj centroj ligiĝas kun funkcioj de kortiko, kiu troviĝas sub influo de impulsoj el subkortiko, mem reguligante funkciadon de la centroj *(Żebrowska 1966)*.

* d-ro, estro de Sociologia Laborejo en Instituto de Socia Medicino, *ul. Bartka Zwycięzcy 11/1, 58-500 JELENIA GÓRA*.

** erĝo = interna instigo agi direkte al celo, kiu prezentiĝas al la psiĥo kiel donanta kontentiĝon aŭ plikontentiĝon *(Piron 1979)*.

Tial — krom la apartaj okazoj — en la nuntempa psiĥologia terminologio oni observas tendencon samigi **emocion** kun **afekcio**. En la aplikataj dividoj je du klasoj, emocioj estas malpli komplikaj, pli primitivaj (ekz. timo aŭ kolero), diferencaj disde la pli superaj (ekz. honto, envio, solidareco), nomataj afekcioj. En emocioj pli forte manifestiĝas fiziologiaj simptomoj *(Reykowski 1974)*.

Psiĥologoj, esplorantaj afekciojn, akorde konstatas principajn diferencojn inter la emociaro de infanaĝo kaj maturaĝo. La ŝanĝoj estas videblaj ne nur en la esenco de travivaĵoj, sed ankaŭ en ĝia formo, t.e. en la kuro, ritmo, intenseco. Kaŭzojn de la juneca emociiĝemo ili trovas same en la fiziologia sfero (transformiĝo de la hormonaj funkcioj de la organismo) kaj en la sfero de pli kaj pli vastaj sociaj spertoj. Tiujn precizajn distingojn (*Żebrowska 1966*) mi preterigas, pritraktante en plua parto de la artikolo nur la ecojn de la evoluintaj afekcioj.

Afekcioj estas efiko de la socia evoluo de individuo kaj respegulas lian(ŝian) rilaton al objektoj, homoj kaj ideoj kiel portantoj de sociaj valoroj; tamen la skalo travivadi — ekde plezuro ĝis malplezuro — similas al tiu de emocioj *(Szewczuk 1979)*.*

Afekciiĝado estas sfero de travivado tre diversa kaj diversmaniere kunigita kun ceteraj psiĥoprocesoj (la ekkonaj kaj la volaj). Rilatiĝo de la homo al objekto aŭ al iu komplika situacio dependas de lia(ŝia) orientigo en la medio, de la scio kaj spertoj, kiuj permesas kompreni signifon de la objektoj kaj la situacioj por si kaj por la aliaj personoj.

Alia grupo de la travivataj faktoroj — la agoj, diversaj fazoj de ilia daŭro, renkontataj obstakloj, (mal)prosperoj k.a. — estas ankaŭ riĉa por individuaj kvalitoj. Decidantan signifon havas la konscio de iliaj valoro kaj graveco por la propra sorto kaj la socio.

Difinitan emocian rilaton ni esprimas ankaŭ al nia personeco, al ĝia pritakso fare de la medio, al nia agado kaj ĝia rezultaro. La rilato sekvas el emociaj reagoj je la procesoj de formiĝado de la subjektiva kaj respegulata

* Afekcia proceso, estante specifa reago de organismo je ŝanĝoj de ekstera kaj interna medioj, havas tri konsisterojn. Unua el ili — komuna por ĉiuj ŝanĝoj de ekvilibro — estas afekcia instigo, kiu kondiĉas ŝanĝojn en la organismo... Dua estas kunigita kun signifo de la subjekto por la evento — ĉu ĝi estas negativa por la subjekto aŭ ne. La tria ligiĝas kun kvalitaj ecoj de la evento (esenco de la emocio). Depende de la esenco, la specifaj afekciaj reagoj iel manifestiĝas. (Laŭ *J. Reykowski 1974*).



**membildoj** *(Szczepański 1973, Tyblewski 1977)* kiel rezulto de socia influo.

Objektoj, personoj, iliaj kondutoj kaj situacioj estas por ni **emocifontoj.** Oni distingas la originajn kaj devenajn fontojn. La origina emocifonto estas la evento aŭ fakto mem; dume la devena estas ĝia memorigo, rememoro.

Ekzistas emocioj (afekcioj) pozitivaj (propulsaj) kaj negativaj (forpuŝaj) — depende de la stimulspeco, emociobjekto aŭ ĝia daŭro *(Zawadzki 1970)*.

Pozitivaj emocioj helpas strebi al difinitaj celoj kaj situacioj, faciligas formiĝadon de favoraj sintenoj kaj aprobon de la valoroj kaj inklinigas al pozitivaj pritaksoj. Ili ankaŭ fiksas la bezonon akiri valorojn kaj akcepti influon kaj agadon de la personoj, kiuj portas la valorojn.

Negativaj emocioj kontribuas al farigo de ĉio, kio ilin naskas. Ili diktas negativajn reagojn, sugestas foriĝi de la difinitaj objektoj kaj personoj, puŝante rezigni pri aŭ eĉ fuĝi de sia fonto.

Emocioj (afekcioj) aktivigas psiĥan vivon kaj faciligas formiĝon de favoraj sintenoj de la individuoj rilate al objektivaj valoroj.

Inter kategorioj de emociaj procesoj distingiĝas la travivado de plezuro kaj malplezuro.

**Malplezuro** akompanas nekontentigon de biologiaj erĝoj, anatomifunkciajn denormigojn kaj malsanstatojn de internaj organoj *(Nishi 1964)*. Ĝi aperas ankaŭ en maloportuno kaj laco, kiam nervosistemo kaj organoj estis tro ŝarĝitaj pro aktiveco. La malplezuro influas farton kaj agordojn. Fonto de malplezuroj estas ankaŭ situacioj, en kiuj oni devas haltigi la komencitajn agojn aŭ solvi la konflikton inter strebemo kaj malstrebemo al iu celo.

**Plezuro** aperas dum kontentigado de biologiaj kaj psiĥaj bezonoj post likvido de iuj streĉoj. Lerta funkciado de nervosistemo kaj de korporganoj, ilia modera intenseco, vigleco fluanta el ripozo kaj sano, estetika harmonio, realigo de esperoj kaj efektivigo de aspiroj estas i.a. fonto de plezuroj.

**Pri viva signifo de afekcioj decidas ilia influo je aktivado**

Kiam emociaj procesoj estas intensaj, sed moderaj, la agoj farataj de la persono daŭras streĉe, sed sen laco. La fenomeno aperas dum pozitivaj afekcioj, kiuj povas ankaŭ esti impulso por agi, kaŭzante emocian streĉon. Tamen dum negativaj ili povas esti obstaklo en strebado al la celo kaj efektiva bremso de la aktivado.

Emocioj influas ankaŭ direkton de agoj, ligante nin kun pozitivaj celoj aŭ kaŭzante evitadon de la negativaj. Finagado estas ankaŭ fonto de pozitivaj emocioj kaj la atingita efiko povas veki ĝojon kaj esti erĝo por pluaj penoj, altigante aspiron kaj atendon de pli kaj pli bonaj atingoj.

Inter afekcispecoj oni distingas:
la **intelektajn**, kies fonto estas rekonado de la realo (interesiĝemo, dubemo);
la **sociajn**, kiuj naskiĝas dum kunvivado kaj kunagado kun aliaj homoj (la pozitivaj arigas homojn kun si kaj ligas kun valoroj de la vivo, la negativaj povas kaŭzi kondutojn kaj agojn malamikajn aŭ puŝi al detruiĝo de valoroj aŭ kontraustarigi individuon al iu grupo); al la pozitivaj sociemocioj oni kalkulas: solidarecon, fratecon, favoremon, simpation kaj ankaŭ tiujn, kiuj respegulas rilaton de la persono al si mem, respondecon pri sia interna vivo, pri akiritaj scipovoj aŭ pro socia taŭgeco (honto, fiero).

Apartan grupon formas la estetikaj afekcioj, esprimantaj rilaton de la personoj al objektoj, situacioj aŭ procesoj koncernantaj belon, harmonion kaj ilian kontraŭon (ekz. ravo, abomeno).

## 3. Turisma fontabundeco

«Kiam nian korpon tuŝblovetas varma vento; kiam ni proksimigas al vizaĝo florplektaĵon; kiam en varmoza julia tago oni donas al ni malvarman akvon kaj post tuttaga marŝado proponas banon, en ĉiuj-ĉi diversaj cirkonstancoj ni travivas ion, kio en ili ripetiĝas. Pri la statoj kaj iliaj stimuloj ni parolas, ke ili estas plezuroj... Kiam iu grincas per dentoj sur glaseĝo; kiam ni devas sidi aŭ stari kelkajn horojn en maloportuna pozicio; kiam el tegmento gutas sur nian nukon malvarma akvo; kiam ni devas flari odoraĉon de hidrogensulfido aŭ kiam ni mordas vermon en florbrasiko, denove ni scipovas en la vico de la komplikaj travivaĵoj rimarki ion, kio en ili ripetiĝas, kaj kio decidas pri ilia simileco. Jen malplezuro» *(Witwicki 1946,* p. 226*)*.

Dank'al turismo, hazarda kontakto de unu homo kun la alia tre ofte transiĝas en la socian personan kontakton *(Szczepański 1973)*, kiu defendas la individuon kontraŭ soleco kaj en nombraj okazoj estas fonto de pozitivaj afekcioj. Ĉi-maniere turismo firmigas sociajn ligojn kaj iusence difinas ilian karakteron; ilia manko estas kaŭzo de izolo de individuoj kaj foje eĉ minacas perdi la psiĥan ekvilibron.

Daŭron de la kontaktoj tre influas tipo de reciprokaj agoj, elinter kiuj la



opoziciecaj, la punecaj kaj malamikaj* *(Bales 1950)* kreas la fenomenon, rimarkatan efektive ofte. Unuflanke do, turismo formas grandan ŝancon defendi sin antaŭ komplikoj de la nuntempa socia vivo, duaflanke — ĝi kaŭzas la riskon fiksi tiujn ĝiajn ecojn, for de kiuj ĝi donas eskapemon.

Estas evidente, ke por ĉiu individuo la plej grava kaj plej emociriĉa estas «propra mondo», en kiu la influo de diversaj faktoroj ne estas egala kaj ŝanĝeblas. En turismo, situo de la memo rilate al aliaj monderoj ŝajnas jena (instige de *Muszyński 1974*):




Ĉiu el ili aparte aŭ kunplekte influas konscion de la turisto; tamen ŝajnas, ke ĉele rolas tiuj tri: la naturo, aliaj homoj kaj la renkontata kulturo (en la plej vasta kompreno de la nocio).

La kontakto kun ili esta(ad)as plej proksima, ili plej faktoras kaj kundecidas pri kondutado kaj emocioj, pri pensado, (la psiĥa aktiveco) de la turistoj. Provante distingi, kiu el la faktoroj pleje rolas en afekciado, oni devus difini la kategorion de turismo; en la civiliza nuntempa mondo por plejparto de ekskursantoj la naturo perdis ekz. forton de la negativa faktoro, kiu decidas pri kuro kaj daŭro de la vizitado. Tamen ĝia signifo por la travivataj emocioj probable grandiĝis, kompare kun signifo de diverstipaj kulturaĵoj, prezentataj al turistoj. Aliflanke, ĉe la evoluintaj turistoj, kiuj atingis grandan senteblecon, oni observas profundajn travivaĵojn pro la naturo; okazadas al ili fortegaj ravoj kaj profundegaj kortuŝoj dum bonŝancaj cirkonstancoj de la vojaĝado. Evitante detalajn argumentojn, mi dirus nur, ke pro karakteriza ŝanĝebleco de turismaj kontaktoj, pro ilia tempa limiteco, influas ĉefe aŭ nur tiuj, kies senpera kunesto kaj sufiĉa forto povas stimuli. Ĉikaŭze, la valoraro de la vizitata socio kaj la socio mem (ekz. en sia strukturo kaj institucioj) ne estas sufiĉe rekoneblaj kaj akcepteblaj. Dume la perceptata naturo, la kontaktiĝanta persono aŭ verkoj de la kulturo povas lasi en la

* Laŭ *Bales*, ĉiujn reciprokajn agojn kaj reagojn de la personoj, kiuj komune devas solvi iun ajn problemon, oni povas klasi en 12 kategorioj, el kiuj ni citu nur la negativajn: 10) esprimado de malkontento, manifestado de foriĝo, substrekado de formalaj mankoj; 11) streĉiĝado, rezignado; 12) manifestado de antagonismo, kritikado de aliaj, substrekado de sia graveco. Ĉi-tiuj kondutoj afekcias, integrante negative.

konscio de turisto rimarkeblajn spurojn aŭ stimuli viglajn afekciojn.

## 4. En socia realo de Pollando

En la plejmulto da konstatoj pri turismo oni nur akcentas la ŝancon senti aŭ emociiĝi, tro malofte rimarkigante sociajn kondiĉojn, en kiaj la emocioj ekiĝas kaj daŭras.

Observado de turisma realo en Pollando* devigas konkludi, ke la seniluziiĝoj, kies atestanto kaj viktimo ofte estadas turisto, konsistas ĉefe en rezigno pri io, konsento kun iu manko, agnosko de iu malpovo kaj travivo de negativa emocio.

Tial turismo ne estadas sufiĉe ofte la ŝanco travivi pozitivajn sociafekciojn (la favoremon aŭ solidarecon), ĉar tro multaj streĉoj ne permesas ilian naskiĝon aŭ likvidas apenaŭ naskiĝintajn. Preskaŭ konstantaj situacioj de rivaleco en atingado de turismaj bonaĵoj (ekz. manĝaĵo, oportuno k.s.) vekas nervostreĉojn kaj eksplodas per kolero kaj agresemo.

Ekskursano relative ofte ne trovas eblecon de tia travivado de la vagado, kiu — akorde kun liaj (ŝiaj) atendoj — kaŭzas la plezuron. Neatenditaj obstakloj en la lokoj kaj cirkonstancoj, kie ili devas ne aperi, simple surprizas, bedaŭrigas, kolerigas aŭ furiozigas, frustrante** la ekskursanon *(Tyblewski 1979)*.

Pro granda nombro da polaj turistoj, kortuŝo estas neatingebla emocio, ĉar aŭ la programo de la ekskurso aŭ ĝia fuŝa realigo pro organizaj kaŭzoj, forigas iun ajn pozitivan travivon. Rezulte la turisto ofte rehejmiĝas kun rememoro de la negativa emocio, kiu reduktas la efikon de intencita ripozo kaj malstreĉiĝo *(Reykowski 1974)*.

Ŝajnas, ke — kun neeviteblaj simpligoj — oni povus konstati jene: La postmilita mizero kaj la provoj amasigi civitanan ripozadon okazis en Pollando je kosto de turisma kvalito.

Tiamaj neeviteblaj nombraj devoj rezigni pri iu atribuata bonaĵo aŭ priservo formis specifan normon de altruisma kompromiso***, laŭ kiu pola

* Preskaŭ ĉiu numero de iu ajn semajnorevuo *(Polityka, Kultura, Literatura, Argumenty, Życie Literackie)* alportas iun ĉi-konfirman raporton. V. ankaŭ *Tyblewski 1977ă*.

** Frustri (tr): kaŭzi ĉe in senton de vanezo, senigi iun de atendata aŭ esperata kontentiĝo.

***En sociologia literaturo oni indikas ekziston de t.n. «egoisma kompromiso» kiel modelo de sociagado, estanta akordigo de adaptiĝemo kaj opoziciemo. Proponata ĉi-tie nocio de «altruista kompromiso» akcentas la pozitivan devenon el civitana komprenemo; ĝia karakterizo estas ŝajne la portempa adaptiĝo sen opoziciemo, kun relative mildigitaj antaŭjuĝoj. kp. *Tyblewski 1979b, Znaniecki 1928.*



turisto ne protestis, kiom oni devigis lin veturi en la plenŝtopita aŭtoĉaro, suferi maloportunon de primitiva hotelo, manĝi malbongustajn nutraĵojn aŭ aŭskulti neutilajn mesaĝojn el buŝo de la propagandema ĉiĉerono.

La spontana fruperioda konsento «por la malbona, sed la nia» estiĝis por difinitaj politikaj decidantoj kaj organizantoj la pruvo de «patriotismo», kies spuroj manifestiĝas fojfoje en nuntempa pensado *(Tyblewski 1979b)*.

Nombraj emocistreĉoj, bremsataj en la nomo de «patrujamo» aŭ de «pli alta devo», eksplodadas en interpersonaj rilatoj, ĉar agreson inter personoj oni pardonas, dume la kritiko de ŝtata institucio estas nepardonebla*.

Ni rajtas hipotezi, ke la eksplodemo, observata ĉe turistoj, estas ne nur reagmaniero je la stimuloj el turismo mem, sed ke en ĝi manifestiĝas emocioj kaj afekcioj, naskiĝantaj en la plej vasta socia vivo, devenantaj el ĝia interna kaj ekstera komplikoj.

## 5. El la esploro

Kiel montris la esploroj de eksperimenta psiĥologio, la pozitivaj emocioj, ligitaj kun sperto de sukceso aŭ prospero ĝenerale favoras pli bonan agadon; la negativaj emocioj rezulte de malprospero ĝenerale malplibonigas agadon. Ne sen influo je la agado estas ankaŭ esenco de la emocioj kaj afekcioj.

En la esploro gvidata de la subskribinto la respondintoj konsistis el:

| lernantaro | | studentaro | | instruistaro | |
|---|---|---|---|---|---|
| knaboj | knabinoj | viroj | virinoj | viroj | virinoj |
| 3,33% | 6,44% | 8,74% | 13,68 | 17,53% | 50,25% |
| aĝo 16 - 19 jaroj | | aĝo 20 - 30 jaroj | | aĝo 19 - 55 jaroj | |

En la enketilo ili ricevis i.a. jenajn demandojn: Kio plej plaĉas al vi kaj kio


* Kun drama reliefeco oni vidas tion en nuntempa socia protesto kontraŭ maljustaĵoj kaj krimoj de la regintoj. La provo akiri rajton kritiki finiĝis per uzo de la perforto kaj defendo de la senŝanĝaj rilatoj inter la civitano kaj la ŝtata institucio.

plej malplaĉas al vi pri: 6) turistoj, 9) fremdlandanoj, 16) reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj loĝantoj de via regiono?

Detalan kunprezenton de la respondoj laŭ ricevita kvanto enhavas tab. 1, en kiu estas preterigita la opinio de instruistaro pri fremdlandanoj, kiun mi prezentis en aparta artikolo *(Tyblewski 1978b)*.

Adaptante ĉi analizadon al la difino de turismo *(Przecławski 1979)*, oni povas atribui al ĉiu fonto de travivado kaj kontakto la konvenajn emociojn, kies apero estas pruvita en multaj spertoj. Tian atribuon enhavas tab. 2, ankoraŭ nekompleta kaj kompletigenda fare de atentaj legantoj.

Tipa daŭro de interhoma (aŭ interelementa) kontakto okazas en jenaj fazoj kaj manifestiĝas en sekvaj fenomenoj:




Kompreneble ne ĉiam alia homo estas emocifonto; en turismo ja fontas preskaŭ ĉiuj dinamismaj situacioj. Okazas momentoj de la plej profundaj travivoj en plenega silento, sen akompano de iu ajn estaĵo, dank'al simpla kunesto kun la natura fenomeno. Tamen en la plej tipaj situacioj de nuntempa turismado la plejmulto okazas dank'al kaj kun partopreno de aliaj personoj.

La observata fenomeno de eskapemo el iuj socimedioj al la naturo ne signifas mizantropemon; relative ofte evidentiĝas, ke la eskapint(in)o tre alte taksas hazardan renkonton aŭ akompanon de novaj (nekonataj) personoj, kiuj nefoje logas pli forte ol la intencita naturo mem. Tamen la observo koncernas nur parton de turistoj kaj certe ne povas esti ĝeneraligata. Cetere, la psiĥa diferenceo de la homoj determinas iliajn ecojn kaj klarigas malidenteco de la kondutoj kaj sentoj.

* *E. Aronson (1972)*



**Tab. 1** **INDIKITAJ PREFEROJ***

| Demandoj | plaĉas al: | | | | | | malplaĉas al: | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | lernantaro | | studentaro | | instruistaro | | lernantaro | | studentaro | | instruistaro | |
| 1 | 2 | % | 3 | % | 4 | % | 5 | % | 6 | % | 7 | % |
| ĉe turistoj | ĝojo<br>senzorgo<br>ridoj<br>kulturo | 17,1<br>12,3<br>11,2<br>10,5 | gajeco<br>interesiĝemo<br>humoro<br>senpereco<br>ridoj<br>senzorgo<br>favoremo<br>sereneco<br>bonkoreco | 22,4<br>15,2<br>15,0<br>11,2<br>9,5<br>9,0<br>8,0<br>7,3<br>5,0 | gajeco<br>vestaĵoj<br>humoro<br>libero<br>vivĝojo | 27,2<br>15,5<br>14,0<br>12,1<br>10,3 | kulturmanko<br>tromemfido<br>rubaĵemo | 24,4<br>21,0<br>15,1 | kulturmanko<br>laŭteco<br>drinkado<br>kondutoj<br>malpuremo<br>vulgareco<br>primitivo | 28,5<br>25,6<br>13,7<br>11,0<br>10,4<br>9,8<br>7,7 | kulturmanko<br>kondutoj<br>laŭteco<br>malpuremo<br>tromemfido<br>higienaj<br>mankoj<br>blasfemoj | 32,5<br>21,4<br>14,2<br>8,7<br>7,0<br>6,5<br><br>5,2 |
| en la reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj riĝantoj | favoremo<br>afableco<br>servemo<br>amikeco<br>bonkoreco | 18,1<br>16,3<br>13,0<br>11,0<br>9,8 | favoremo<br>gastamo<br>bonkoreco<br>afableco | 24,3<br>21,9<br>19,4<br>13,2 | respekto<br>honesteco<br>respondeco<br>favoremo<br>bonkoreco<br>rekonado | 21,9<br>18,7<br>11,3<br>10,2<br>9,7<br>7,0 | malfidemo<br><br>malamikeco<br>primitivo<br><br>tromemfido<br>de turistoj<br>malestimo<br>de loĝantoj | 25,2<br><br>20,0<br>12,3<br><br><br>11,0<br><br>10,2 | senkomprenemo<br>eltirado<br>de mono fare<br>de loĝantoj<br>manko de<br>afableco<br>malinteresiĝemo | 27,5<br>23,4<br><br><br><br>19,4<br>12,3 | suspektemo<br><br>akuzemo<br>malhonesteco<br><br><br>senafableco | 22,7<br><br>17,8<br>9,0<br><br><br>4,5 |

* laŭ propra kalkulado

**Tab. 2** **Proturismaj emocioj (afekcioj)**

LA NATURO
ALIA HOMO → MI
LA KULTURO

| stimulataj emocioj (afekcioj)* | |
|---|---|
| pozitivaj | negativaj |
| serenemo | maltrankvilo |
| kortuŝo | tristo |
| admiro | timo |
| ravo | angoro |
| ĉarmsento | terursento |
| kvieto | |
| ekscito | |
| kontento | malkontento |
| ĝojo | malĝojo |
| favoremo | malfavoremo |
| kunsento | sensentemo |
| samsentemo | fremdosento |
| fiero | egoismemo |
| solidareco | envio, ĵaluzo |
| simpatio | malsimpatio |
| admiro | maladmiro |
| amo | malamo |
| amikeco | malamikeco |
| estimo | malestimo |
| honto | frustro |
| kulpsento | konfuzo |
| kortuŝo | kolero |
| interesiĝemo | malinteresiĝemo |
| dubemo | indiferento |
| logo | mallogo |
| admiro | abomeno |
| ekscito | konfuzo |
| harmonisento | |
| bonagordo | |
| kulturpasio | |
| identiĝemo | |

* Ĉiu leganto estas petata kompletigi la tabelon per la travivitaj emocioj kaj (se eble) korespondi kun la aŭtoro, kiu dankeme akceptos ĉiun rimarkon.



Kiel do prezentas la sĥemo, alia homo estas tiu, kies kondutoj plej forte emocias (afekcias) ankaŭ en turismo. Konfirmas tion ne nur la videbligita kvanto de emocioj, sed ĉefe la speco de la homa ekzistado, kiu ja estas socia (interpersona). Tial kaj en la spertoj, kaj en la lingvo de turistantaj individuoj postsigniĝas la homdevenaj emocioj, kiuj multe dependas de la individua sentemo (la personeca evoluo).

## 6. Bibliografio


*Abel, T. (1979): The Foundation of Sociological Theory. — Random House. New York.*
*Aronson, E. (1972): Social Animal. — Freeman a. C. San Francisco.*
*Bales, R. F. (1950): Interaction Process Analysis. — Cambridge, Massachusetts.*
*Danecki, J. (1969): Czas wolny — nurty refleksji społeczney. — Studia Socjologiczne. 3.*
*Libera, K. (1965): Miedzynarodowy ruch turystyczny. - Zakład Narodowy im. Ossolinskich. Wrocław.*
*Morin, E. (1973): Le paradigme perdu: La nature humaine. — Editions de Seuil. Paris.*
*Muszynski, H. (1974): Ideal i cele wychowania. — Warszawa.*
*Nishi, S. (1964):* Nia korpo. — Gunma Esperanto-Socio. *Maebashi.*
*Piron, C. (1979):* Kiel personeco sin strukturas. — SUK (Someraj Universitataj Kursoj). *Liège.*
*Przecławski, K. (1973): Turystyka a wychowanie. — Nasza Ksiegarnia. Warszawa.*
*Przecławski, K. (1979): Socjologiczne problemy turystyki. — IW CRZZ. Warszawa.*
*Reykowski, J. (1974): Eksperymentalna psychologia emocji. — Książka i Wiedza. Warszawa.*
*Szczepański, J. (1973): Elementarne pojęcia socjologii. — PWN. Warszawa.*
*Szewczuk (red.), W. (1979): Słownik psychologiczny. — Wiedza Powszechna.*
*Tyblewski, T. (1977a):* La turisma turmento. — *Wiadomości, 42, 1—4. Warszawa.*
*Tyblewski, T. (1977b):* El regionoj de la memo. — SCIENCA REVUO 119-126. *Beograd.*
*Tyblewski, T. (1978a): Przezywanie w turystyce. — Kultura Dolnośląska, 1-2.*
*Tyblewski, T. (1978b): Contact vécu avec les étrangers. — Revue de Tourisme, 3, 15-17. Bern.*
*Tyblewski, T. (1979a): Turystyka jako źródło emocji. — Semin. Uniw. Warszawa.*
*Tyblewski, T. (1979b): Rola przewodników tutystycznych w wychowaniu. — Polskie Towarzystwo Turystyczno-Krajoznawcze. Warszawa.*
*Witwicki, W. (1946): Psychologia, vol. 1. — Kraków.*
*Wojeciechowski, K. (1973): Wychowanie dorosłych. - Zakład Narodowy im. Ossolinskich. Wrocław.*
*Zawadski, B. (1979): Foundation of Personology. — PWN. Warszawa.*
*Znaniecki, F. (1928): Socjologia wychowania, vol. 2. — Poznań.*


## *Uczucia w turystyce*


*Dojrzałość, równowaga emocjonalna sła niezbędnymi warunkami współżycia i współdziałania ludzi; gwałtowność i niestałość uczuć powodują zrywanie styczności, wywołują konflikty, prowadzą do odrzcania celów albo zaniechania działań. Jest sprawą oczywistą, ze naprawa polskiej turystyki musi mieć oparcie w ekonomice z rozmachem przekraczajacym dotychczasowe próby. Stanowi to podstawowy warunek jej zmiany ja-kościowej. Jednakze wielka siła sprawcza tkwi w zasobach spłecznej energii i woli, które — wyzwolone z ograniczeń — mogłyby nadać polskiej turystyce inne znamiona. Sprzęzenie tych zaleznościi jest na tyle mocne, ze zmiany nie mogą nastąpić jedne bez drugich.*